

& Estas mi esperantisto:

< Ripete 13 sed rekante 9 el 25 batoj por strofo, entute 250 paŝoj dum 3 minutoj.
Verkis Julio Baghy. Baladigis Martin Strid (2016) per ŝotisa melodio sveda.>

(#Melodio:

<:25> (/dodo do3re doTi TiSo; rere so3fa mido dodo; LaLa do3La LaSo SoSo; So3So
Ti3re redo dodo <[la:mi]> mi3re mi3re doLa SoMi; So3So Tire redo do do <[So.do]>
)×10)+

(& Strofoj:

'1 Verda stelo sur la brusto ; iom palas
pro la rusto. (; Mi ne estas purigisto (×;;
estas mi esperantisto.))×

'2 Kuŝas ie sub tegmento ; "Netuŝebla
Fundamento". ; Tuŝu ĝin nur la Mefisto
.....

'3 Polvkovrite sur bretaro ; putras mia
SAT-vortaro. ; Tedas min la vorto-listo
.....

'4 Gramatikon mi ne konas ; kaj
gazeton ne abonas... ; Librojn legu la
verkisto

'5 Mi parolas kun rapido: ; "Bonan
tagon! Ĝis revido!" ; Ĝi sufiĉas por
ekzisto;

'6 Pionirojn mi kritikas, ; la gvidantojn
dorne pikas ; kaj konspiras kun persisto
.....

'7 Por la venko mi esperas, ; sed
neniom mi ofertas. ; Mi ne estas ja
bankisto

'8 Se baraktas en la krizo ; la movado,
organizo, ; helpas mi nur per rezisto

'9 Flugas per facila vento ; el la buŝo
Nova Sento. ; Ĝi sufiĉas por sofisto

'10 Post la mort' ĉe tombo mia ; staros
"rondo familia" ; ; nekrologos ĵurnalistoj:
; **estis li esperantisto.**)